

Pli valoras tuj ovo, ol poste bovo.^z

HUNGARAJ POPOLDIROJ

PRI OVOJ

En preskaŭ ĉiu lingvo troviĝas proverboj, popoldiroj kaj parolturnoj temantaj pri ovoj. Ĉi-sube mi prezentas kolekton da tiaj esprimoj tradukitaj el la hungara lingvo. Mi provis aranĝi ilin laŭ la ecoj mem de la ovo.

En Hungario, same kiel aliloke, ĉiuj ovoj estas pli-malpli la samaj laŭ formo, do estiĝas la esprimoj: **Ili similas unu la alian kiel du ovoj kaj nenio estas pli simila ol unu ovo al alia.**

Ĉiu scias, ke ovoj estas facile rompeblaj. Ankaŭ pri aliaj delikataj substancoj oni diras **rompiĝema kiel ovoŝelo**. Pro tio estas necese trakti ilin kun zorgo. La hungaroj diras: **Tiel traktu aŭ zorgu ion aŭ iun kiel ornamitan ovon**. Nu, ĉiu ovo devas esti delikate traktita, sed en la hungara esprimo estas aludo al la bele ornamitaj pask-ovoj. Se oni diras pri persono, ke li aŭ ŝi estas **sama kiel la ornamita ovo**, tio signifas, ke la persono havas sentivan, ofendigeblan karakteron.

Se ovo rompiĝas, tio estas neinvertigebla okazintaĵo. **Rompitan ovon oni ne kunlutas aŭ la rompitan ovon la forĝisto ne kunlutas**. Tiu esprimo estas aplikebla al la situacio de mortonta malsanulo.

Iom alia estas la interpreto de jenaj diraĵoj: (1) **Se ovo unufojon rompiĝas, ne estas iu forĝisto, kiu riparos ĝin**; (2) **La ovo nur unufojon rompiĝas**. Tie ĉi oni volas diri, ke perdita honoro, honesteco aŭ ĉasteco ne plu estas reakirebla.

Tamen, se estas necese okupiĝi pri ovoj – aŭ entrepreni alian delikatan, tiklan aŭ riskan aferon – la homoj diras, ke **oni iras, paŝas aŭ dancas sur ovoj**, t.e. oni devas esti tre singardema. Se estas dirite pri veturilo, ke **ĝi portas ovojn**, tio signifas, ke ĝi iras tre malrapide.

Hungaraj pask-ovoj estas bele ornamitaj per ruĝa koloro kaj ankaŭ per pentritaj desegnaĵoj. Se io estas tre bela aŭ bone kunmetita, oni diras, ke ĝi estas tiel bela kiel **ornamita pask-ovo aŭ ĝi venis el ruĝa ovo**.

La ovo simbolas ankoraŭ nematuran aspekton de la vivo, kaj tio estas esprimita figure pri sensperta aŭ tro juna persono en jena eldiro: **Li apenaŭ ŝovis sin el la ovo**. Estas direble pri nematura infano, ke **ovoŝelo ankoraŭ estas sur lia postaĵo aŭ dorso**.

Kelkfoje tia nematurolo impertinente volas instrui aŭ ordoni al aliaj. Tiam li aŭdas jenan riproĉon: **Ovo deziras esti pli saĝa ol kokino aŭ la ovo instruas la kokinon aŭ ovo ordonas al sia patrino**.

Io, kio okazas tre rapide, en nur kelkaj minutoj, daŭras **ĝis ovo kuiriĝas**. Post kuirado, oni ne havas grandan elekton rilate la uzon de ovo. Pro tio **el kuirita ovo ne venas multaj kokinoj**. Alivorte, se io estas tute fuŝita, oni jam ne povas rebonigi ĝin. Variaĵo akcentanta la limigitan utilon de ovo estas jena: **El ovo neniam estiĝas grafo**. Nur el taŭga materialo eblas fari taŭgan objekton. Diferenco inter ovoj kaj homoj troviĝas en la sekva esprimo: **Pli rapide kuiriĝas la mola ol la malmola ovo**. Infano kun milda karaktero estas pli facile edukebla kaj alkutimigebla ol obstina infano.

Komparo inter ovoj kaj ŝtonoj emfazas la similecon: **Ne gravas, ĉu oni elektas la ovon anstataŭ la ŝtono, aŭ la ŝtonon anstataŭ la ovo**. Se iu elektas unu solvon aŭ la alian, ĉiuokaze li agas malbone. Por instrui, ke la enhavo estas pli valora ol la eksteraĵo, oni diras: **Ne la korbo estas la plej grava, sed la ovoj en ĝi**.

La **ovo de Kolumbo** estas konata ankaŭ en Hungario. Ĝi aludas al memkomprenebla solvo de problemo, kiun ĝis nun neniu trovis. Onidire, al Kolumbo estis prezentita jena problemo: kiel meti ovon sur platan tablon, tiel ke ĝi staru sur unu el siaj ekstremajoj? Kolumbo malforte frapetis la ekstremajon de la ovo sur la tablon kaj starigis ĝin. Tiu anekdoto estigis du popoldirojn: (1) **tiel simpla kiel la ovo de Kolumbo kaj** (2) **ankaŭ la ovo starigis, se vi rompas ĝian kapon**. La dua signifas, ke per iom da perforto kaj lertado estas eble aranĝi ĉion.

Mi ankoraŭ ne elĉerpis ĉiujn ekzemplojn; kelkaj estas iom obskuraj kaj bezonas klarigojn pri la hungara folkloro kaj popolaj kutimoj. Inter la pritraktitaj esprimoj, ĉu ĉiuj estas facile kompreneblaj transkulture, t. e. fare de homoj el diversaj mondpartoj? Kiel reagas popoloj, kiuj ne kutimas manĝi ovojn? Ĉu en via gepatra lingvo troviĝas ekvivalentaj esprimoj? Ĉu temas pri ovo aŭ pri aliaj manĝaĵoj kaj objektoj? Kial estiĝis tiuj diferencoj? Fine, ĉu vi povas formuli pli trafajn Esperantajn versiojn de kelkaj el la hungaraj popoldiroj pri ovoj?

La malnovaj filozofoj envicigadis matematikon en filozofiajn disciplinojn. Tio estis normala konsekvenco de la scienca traktado, kio ne kaŭzas, ke ni nuntempe envicigas matematikon en tiun grupon da studobjektoj, kiuj kun la ĉiutaga vivo havas multan ligitecon. Tiusence la matematiko estas ofte pura abstrakcio. Kiam mi kiel junulo iufoje plendis pri mia eta scio el matematiko al iu honorinda eksterlanda lerneja konsilisto por tiu studobjekto, sen granda pripenso kaj subite li respondis, ke mi ne havis bonan instruiston. Mi estas konvinkita, ke mian etan matematikan konon kaŭzis ankoraŭ io: ni havis niatempe nek bonajn lernolibrojn nek altirajn manlibrojn, minimume ne tiajn, kiajn ĉeĉmanas la hodiaŭaj generacioj.

Dum la lastaj kelkaj jaroj la eldonlibra entrepreno „Školska knjiga” el Zagreb eldonis kelkon da escepte interesaj kaj, inter la lernantoj kun granda entuziasmo akceptitaj manlibroj, dank’ al la aŭtoro de tiuj libroj, al mag. Zlatko Šporer. Kial estas liaj libroj tiom serĉataj kaj tradukataj, kial altnivele pritraktas ilin ankaŭ la plej grandaj elektemuloj, rakontu al ni la aŭtoro mem.



– Via libro „Babilado pri geometrio” estas la plej serĉata. Kiel oni en kaj pri la geometrio babiladas?

En ĉiuj kaj pri ĉiuj sciencaj kampoj, kiel, interalie, en la ĉiutaga vivo, oni povas babiladi kaj parolaĉi. En ĉi tiu libro mi ekdeziris celumite interparoli konatigante la lernantojn kun la bazaj geometriaj nocioj, reguloj, figuroj kaj rilatoj inter ili. La dialogo estas senĉese gvidata inter petolema kaj scivolema lernanto, kiu volonte trarigardas aferojn el la vidpunkto de serĉo, amuzo, unuflanke kaj mildnatura, pacienca profesoro, kiu ne koleras eĉ tiam, kiam oni starigas al li la plej nekutimajn demandojn (pri kiuj iu „vera” profesoro povus severe faldi la frunton), aliflanke. Miaopinie, la konversacimétodo estas tre konvena por direkti la junan leganton al iu ajn laborkampo, samtiel al geometrio. La avantaĝoj de ĉi tiu metodo estas larĝe konataj. La malnovaj grekaj filozofoj bone konis kaj ofte skribis pri ĝi ofte uzante ĝin en la instruado. Nome, en la dialogo ni povas elstarigi unuavide tre „naivajn” simplajn demandojn, kiuj tiel ofte trafas la esencon de afero, eĉ pli bone kaj sukcese ol iu profundsaĝa sed senviva instruado.

MATEMATIKO ESTAS AMUZO



JEN, TIEL NI EKKONIS DIVERSAJN
LOĜANTOJ DE LA EBENO KAJ
ILIAJN KARAKTERIZOJN.
NI SCIAS, EKZEMPLE, KE LA
TRIANGULO POVAS ESTI



— Ĉu ankaŭ pli malbonaj lernantoj pli sukcese babilados pri geometrio, post kiam motivigos ilin via libro?

Antaŭ ĉio, ĉi tiu libro celas motivigi, interesigi la lernanton pri geometrio, plifaciligi la lernadon de iu difinita instrumaterialo, ebligigi al la lernanto testi sian konon senhelpe de la instruisto. Tial troviĝas en la libro difinita nombro da netipigaj taskoj. Sed neniu libro sukcesis liberigi la lernanton de liaj propraj penado kaj diligenta lernado. Nome, ne eblas al iu doni kaj donaci scion; oni devas akiri ĝin per sia, propra laboro. Kiamezure atingos ĝin ĉiu unuopa lernanto, dependas, sendube, de li mem.

— Matematiko en bildstrioj estas preskaŭ unika provo en la monda manlibra literaturo. De kie al Vi tiu ideo?

Estas ĝenerale konate, ke la infanoj volonte akceptas informojn pere de bildoj (televideo, filmo, desegnaj filmoj...) kaj ke tekstaj kaj parolaj informoj apogataj per bildoj vekas pli grandan intereson, kaj la infanoj pli bone kaj pli daŭre memoras ilin. Ni ĉiuj, infanaĝaj, volonte legis bildstriojn. Sufiĉas do ekmemori pri sia infanaĝo kaj — la ideo estas prezenta, ĉu ne? Ĉar mi ankaŭ pli frue bonege kaj sukcesplene kunlaboradis kun la elstara majstro de Zagreba lernejo de desegna filmo Nedjeljko Dragič, ni

decidis kune prepari la bildstrian libron, en kiu ni deziris sistematike prilabori instrumaterialon el geometrio por la pli malaltaj klasoj de elementa lernejo. Inda estas la fakto, ke tiu geometria materialo estas facile, tiamaniere prilaborata.

— Kion vi kiel matematikisto deziras rekomendi al la junularo?

Laŭ mia opinio, estas ege utile kaj necese, ke la junaj homoj, kiel eble plej frue, komprenu, ke ili povas akiri rezultojn, scion, ankaŭ iun deziratan scinivelon el matematiko, nur per sistematika kaj persista laboro. Mi scias, ke tio ne estas originala, sed tamen tio estas vera.



MARIJA HORŽINEK

(Marija Horžinek)

MILITO

Knaboj transportis ĝus kolektitan paperaĵon, en ĉaretoj. Ili transdonos ĝin al la lernejo kaj ricevos meritan laŭdon, eĉ, premion. Malnova papero estas valora materialo de kiu en fabrikoj fariĝos nova, necesa por libroj kaj gazetaro.

Joĉjo kaj Peĉjo antaŭgvidadis, ĉiu sian grupon.

La knaboj interparolis pri diversaj temoj. Inter aliaj, ankaŭ pri milito. Sen stultaj, plej ofte senkiaj militoj, la mondo certe estus pli riĉa. Ankaŭ per necesa papero. La libroj ne estus tiom multekostaj. Estus sufiĉe da ĉiuspecaj dolĉaĵoj por infanoj kaj benzino por aŭtomobiloj.

Anstataŭ aŭtomobiloj, homoj denove uzas jam forgesitajn biciklojn kaj, pro transporto de diversaj varoj, malnovajn puŝveturilojn.

Tion ankaŭ faris ili, knaboj. Malnovaj ĉaretoj por malnova papero.

— Plenkreskuloj estas stultuloj — diris Joĉjo — Ĉu ili, veras, ne povas kompreni ke milito estas superflua.

— Ĝi estas vera katastrofo — asertis Peĉjo — batalo, tute vana, sen venkontoj.

— Kaj post kiu sekvas kataklismo.

— Kial, do, la homaro militadas? — demandis iu knabo.

— Kial? — malkonvinke ekklarigis Joĉjo — Mi jam diris: la plenkreskuloj estas stultuloj. Ili ne pensas pri la konsekvencoj de siaj teruraj ludoj. Jes, ili ankaŭ ludas, sed pli malsaĝe, pli danĝere ol ni infanoj.

— Ne disŝutu la paperon! — atentigis Peĉjo.

— Kiu disŝutas? Vi kaj ne mi, respondis Joĉjo. El viaj ĉaretoj elfalas paperaĵo.

— Elfalas el la viaj — respondis Peĉjo — viaj ĉaretaĉoj estas plenplenaj je truoj kaj vi ne estas atentemaj.

— Azenoj! — ekkriis Joĉjo kaj lia grupo.

— Simioj — rekriis Peĉjo kaj lia grupo.

Komenciĝis batalo inter la du grupoj, dum kiu renversiĝis ĉiuj ĉaretoj. La papero tutkovris la stratan asfalton.

Alvenis balaistoj kaj per siaj balailoj diskurigis la militantajn knabojn, insultante ilin kaj, eĉ, iliajn geinstruistojn.

— Ĉu vi, eble, en lernejo lernas militadi? Hontiĝu, bubaĉoj!



La knaboj malaperis, salutante unu la alian per insultaj vortoj: Stultuloj! Idiotoj! Azenoj! Simioj!

Post iom da tempo alvenis nova grupo da ĝeneralantoj, kun malplenaj ĉaretoj kaj ekĝojis ekvidante monton el malnova papero. Ili tuj komencis kolektadi ĝin, plenigante la ĉaretojn kaj, per sia laboro, helpis al la balaistoj purigi la urban asfalton. La balaistoj laŭdadis la laboremajn geknabojn kaj iliajn bonajn geinstruistojn, ne sciante, ke ili ĉiuj — laŭdataj kaj mallaŭditaj — vizitis la saman lernejon.

La laŭditaj geknaboj ricevos merititan premion en sia lernejo por bone farita laboro kaj la mallaŭditaj knaboj bedaŭris pro sia propra stulteco.

Jes, milito, ĉiu senkiala batalo, estas ĉiam granda stultaĵo, komprenas saĝuloj. Ili, knaboj, ja, ne estas stultuloj, obstinaj azenoj, simioj, ne povantaj distingi ludon kaj militon.

Ankaŭ la plenkreskuloj povus pli serioze pripensi tion.

Usonaj travivaĵoj



Kiu ne konas Usonon? Tiom da filmoj venas el tiu lando, ĉiutage pri ĝi en la gazetoj, televido; ĝian lingvon kaj kulturon oni ĉie studas kaj ĉie oni pagas per ĝiaj verdaj dolaroj. Tiun landon ĉiuj ni konas tiom ke ĉiu el ni povas senti ĝin kiel alian propran landon. Tiom proksima kaj intima ĝi ŝajnas al mi. Sed ŝajnas. Ĝi kaŝas en si kelkajn ŝokajn sekretojn por ĉiuj eksterlandanoj. Ankaŭ min ne maltrafis tiuj ŝokoj. Unue la lingvo kiu (neniu scias precize pro kio) nomiĝas same kiel unu eŭropa insula lingvo kiun mi kredis bone koni kaj kompreni. Jam en la aviadilo mi ekkredis ke la sameco de nomoj de tiuj lingvoj estas misgvidiga. Ne senkiale iu verkisto diris ke Usono kaj Britio estas du nacioj **dividitaj** per la komuna lingvo! Sed dank' al la Majstro mi vojaĝis al Usono esperante. Cetere ankoraŭ foje pruvigis ke Esperanto estas bonega helpilo por homoj kiuj opinias scii la anglan. Sed, dank' al miaj lingvistaj spertoj post unu monato mi ellernis diri „dankon” kaj postuli manĝi en tiu por mi nova kaj neordinara lingvaĵo.

Dua afero kiu ŝokas estas ke ĉie en tiu lando troviĝas aparatoj tre similaj al niaj telefonoj, eĉ kun simpla funkcio sed fakte temas pri inteligentaj estaĵoj. Oni povas fari nenion per tiu maŝino sen aŭdi iun voĉon kun instrukcioj kion fari. Dum du horoj mi kverelis kun tiuj voĉoj lernante uzi la aparaton. Poste oni diris al mi ke temis pri aŭtomatoj. En la resto de la mondo



oni kutime devas havi monon por telefoni. En Usono tio tute ne nepras. Oni povas telefoni je kosto de la numero vokata kaj mi abunde uzis tiun eblecon ĉiutage vokante miajn malamikojn kaj bopatrinon kiuj ne scias la usonan lingvon krom **jes** per kiu ili respondadis al la nekompreneblaj demandoj ĉu ili pagos la alvokon. Krome oni povas meti en telefonon iun pecon de plastiko („kredit-karto” nomata) kaj paroli. Poste mi en Zagreb ŝtopis ĉiujn telefonojn per plastikaj sed tamen ili ne reagis. Aŭ pli precize: ili fakte reagis tute senfunkcigante sin!

Tria usona ŝokaĵo estas la mono. Ŝajnas ke usona dolaro estas uzata nur ekster Usono. Kial ĝi do nomiĝas „usona”? Eble simila afero kiel tiu pri la „franca salato” kiu ekzistas en ĉiuj landoj krom en Francio?! Usonanoj ĉion pagas per ĉekoj aŭ plastikaj kredit-kartoj. Oni ne portas la monon kun si, laŭdire, pro tio ke oni ne rabu la monon de vi. Kaj vere efike! Oni ne plu ŝtelas monon, oni nun ŝtelas la kreditkartojn.

Ĉiu kreditkarto en Usono estas ĉiopova konsidere ke ĝi ne nomiĝas Uson-ekspreso, ĝin, kompreneble, mi ĝuste havis naive kredante ke la nomo signifas. Sed Usonanoj estas tute nepatriotaj kaj akceptas ĝin tre malofte. Sed dank' al la ĉielo oni ĉie akceptas ĉekojn de Usona ekspreso. La ĉekojn povas ricevi ĉiu posedanto de la karto. Aŭ pli bone, preskaŭ ĉiu. Nur unu lando en la mondo ne havas kontrakton pri ĉekoj kun la usona registaro. Jes, fiere mi agnoskas: mi estas civitano de ĝuste tiu lando! Tiel okazis ke mi en Usono restis sen financoj. Sed la esperantista solidareco neniam perfidas: samideanoj pruntedonis al mi kvincent dolarojn da kontanto por pagi la hotelon. Sed la kasistoj tie afable eksplikis al mi ke ilia hotelo ne akceptas kontanton! Oni proponis al mi uzi la karton, ricevi la ĉekojn ktp. Mi, kiu neniam antaŭe tenis en la manoj tioman riĉecon, rigardis la verdan monon ne kredante ke ĝi povas esti tiom senvalora.

Sed fine ĉio ordiĝis kaj mi ricevis mian salajroĉekon, de la ŝtata

banko. Bonega ĉeko, ĉiuj diris sed tamen mi devis lerni ke per ĝi oni povas pagi nenion krom meti ĝin en bankon aŭ ŝanĝi ĝin. Ne senesperiginte mi kuris al la banko por ŝanĝi la ĉekon. Oni konsilis al mi ne ŝanĝi ĝin en monon sed en: ĉekojn! Sed tiuj aliaj ĉekoj nun estas uzablaj por pagado! Nu bone, mi faru tion mi diris al la bankoficistino.

— Bone, nur diru la numeron de via konto.

— Sed mi ne havas konton en Usono!

— Kiel: ne havas? Ĉiu ja havas konton!

— Sed mi estas eksterlandano!

— Kio? Eksterlandano?

— Preskaŭ tiel. Mi nek havas konton nek volas havi ĝin.

— Mi bedaŭras tiam.

— Atendu! Ĉu mi povas malfermi la konton ĉe vi?

— Jes, ja. Nur doni al mi du legitimilojn.

— Du? — mi ekkriis. — Kiel du?

— Du. — sonis la trankvila respondo.

— Sed mi havas nur unu. Mian pasporton! Laŭ la internaciaj leĝoj ĝi estas la sola legitimito por eksterlandanoj.

— Ne eblas.

— Jes, sed kredu min ke ekzistas strangaj landoj — eĉ plejmulto da ili en la mondo, en kiuj ne ekzistas du legitimiloj.

— Mi ne kredas sed tio ne gravas. Nenio el via ĉeko.

Poste mi eksciis ke mi havis mian uson-ekspreso-karton kiu povis servi kiel identigilo. Ĝi tamen utilis! Sed post garantiado de mia usona amiko per alia kredita karto!

Do ne portu dolarojn en Usono! Pri alia valuto tute ne pensu. Usonanoj eĉ ne kredas ke ĝi ekzistas. Ili ne kredas ke ekzistas usona dolaro. Ili, pli precize, tute ne kredas ke ekzistas mono. „Unue estis la vorto...” — diras la Biblio. Usonanoj kredas ke temas pri preseraro kaj ke devus esti: „Unue estis la karto...”. Vojaĝante al Usono parolu Esperanton, havu la karton!







DO, MI PRENDOS ĜIN PERFORTE DE VI!

MI NE VOLAS DONI!



JEN, TIEL, PRO LA EGOISMO KOMENCIĜAS MILITOJ.

TION MI NUN KOMPRENAS.

TRAS!



HU, KIEL VI BATEGIS MIAN KAPON. PRO TIO MI BATOS VIN.

MI VIN EĈ PLI!

BUM!

TIEL LA HOMOJ INTERBATIĜAS KAJ FORGESAS KE PLUVAS.

FINE ILI EKVIDAS KE TAMEN ESTAS PLI BONE VIVI PACE.

BONEGE VI KLARIGIS TION AL MI. NUN MI ĈION KOMPRENAS.



TIAL NI ĈIRKAŬBRAKOS NIN SUB LA OMBRELO KAJ VIVOS SENMILITE.



ĜES, SED TION VI KOMPRENIS NUR NUN, POST KIAM NI MALSEKIĜIS, INTERBATIĜIS KAJ EN LA MILITO MALBONIGIS LA PLUVOMBRELON.

Andrijaev

JOHÁN VALANO

ILI KAPTIS ELZANI!

EN HOSPITALO

Al Adriano Pipelbom hospitaloj tre malplaĉis. Estis tro da koridoroj, tro da pordoj, tro da iroj kaj venoj kun vestoj tro blankaj. Kaj lia nazo pli ŝatis senti ion alian ol tiun kuracilan odoron.

Li do ege bedaŭris sian nunan situacion: li bezonis informojn, kiujn nur Johano, lia sekretario, povis doni; li bezonis ilin tuj, tiel ke poŝto ne uzeblus; kaj ili estis tiel sekretaj, ke uzi telefonon estus preni sur sin sufiĉan riskon.

Kompatinda Pipelbom! Li aĉigis sian humoron vizite al hospitalo, por ke la informiĝo ĉe juna Johano restu plene sekreta, sed kiom ajn li provis mallaŭti, ĉiuj iliaj vortoj aŭdeblis en la apuda ĉambro, kiu servis kiel ejo por kuraciloj. Tiun kuracilejon oni ja faris antaŭ kelkaj monatoj uzante por ĝi parton de la ĉambro, en kiu Johano nun kuŝis, kaj la muro estis aparte maldika. Kaj ĉar, hazarde, Johano estis nun sola en tiu tri-lita ĉambro, la industriisto opiniis, ke li eĉ ne bezonas flustris.

Lucia, la flegistino, kiu troviĝis en la kuracilejo, tute ne aŭskultis la industriajn sekretojn de s-ro Pipelbom, por ŝi sen-interesajn. Sed kelkaj vortoj de la riĉulo igis ŝin subite streĉi la atenton.

„Jes, Belpar,” li diris, „Belpar estas la plej bona.”

Sekvis kelkaj vortoj de la sekretario, kiujn Lucia ne sukcesis kompreni.

„Mi ne dubas,” daŭrigis la industriisto, „ke vi plenumos tiun taskon plej kontentige, kiel kutime. Sed, mi petas vin, estu plejplej diskreta. Mi ne povas allasi, ke oni sciu, ke la fama Adriano Pipelbom deziras edziĝi, kaj uzas tiucele la servojn de la fama edziĝ-agentejo Belpar.”

Lucian la ama vivo de famuloj ĉiam interesis. Kiam ŝi, tuj poste, faris injekton al Nikolao Barinjo, la juna hemiisto en ĉambro 364, por kiu ŝia koro pli kaj pli ame batis, ŝi

ne povis subpremi la emon ĉion rakonti al li:

„Imagu! S-ro Pipelbom, la fama riĉulo, deziras edziĝi! Li venis viziti sian sekretariojn, kaj mi, tute nevole, hazarde aŭdis ilin interparoli. Li donis al sia sekretario la taskon prezenti lian edziĝdeziron al agentejo Belpar!”

„Pipelbom, ĉu vere? Mi konas tiun ulon. Parte dank' al mi li riĉiĝis. Mi ne agis saĝe, kaj perdis pro li belegan okazon riĉiĝi mem. Nu, nu, tiel iras la vivo. Interese, ke tia homo, kiu sukcesis sur ĉiuj kampoj, ne kapablas trovi mem edzinon, kaj devas tion fari pere de agentejo!”

„Ne al vi tio okazus, ĉu?” Lucia diris kun rideto.

„Ne,” li simple respondis, kun tono tro serioza.

Ŝi rigardis lin, atendante ion plian, sed Nikolao fermis la okulojn.

„Mi sentas min laca,” li diris.

Ŝi direktis al li amoplenajn okulojn kaj diskrete forpaŝis.

GRAFINO

Je dekkvin kilometroj for de la hospitalo, kie disvolviĝis la okazaĵoj ĵus priskribitaj, elstaras belega, malnova kastelo. Ĝi sidas sur altaĵo, kun neforprenebla vido al la rivero, kaj ĝiaj dikaj ŝtonmuroj aspektas kapablaj sukcese kontraŭstari ĉiujn alsaltitojn de la tempo kaj de homoj militemaj. Al la vojaĝantoj, kiuj rigardas ĝin de la vojo laŭrivera, ŝame kiel al la lokaj familioj, kiuj konas ĝin de jarcentoj, ĝi elvokas nur forton kaj riĉecon: ĝi staras tie kiel deklaro de firmeco.

Ve! La vero estas tute alia, kaj precize tion ĵus klarigis la grafino de-Montokalva al sia ĉefservisto, kiel ŝi nomas la viron, kiu servas ŝin, kvankam li ĉefas super neniu, se escepti, eble, la propran edzinon.

„Jes, Cipriano,” ŝi diris malĝoje, „tiel statas la aferoj. Mi ne kaŝis al vi la veron, kiel ajn malĝojiga ĝi estas. Mi ne povas resti ĉi tie. Mi

devos forlasi ĉi tiun belegan domon, ĉi tiun lokon plaĉoplenan, kaj trovi ion ie, kie mia kun malmulta mono ebligos al mi plu vivi. Kredu, ke mi bedaŭros ĝin, kaj vin, Cipriano, kaj ankaŭ vian karan familion...”

„Forlasi!” flustris Cipriano, kaj lia esprimo montris, ke sub tiu sola vorto kaŝiĝis la perditeco de homo, kies vivo ĵus tute disrompiĝis.

Per granda volstreĉo li sukcesis peti precizigon:

„Se via grafina moŝto permesos, ĉu mi povas demandi, kiom da tempo — Laŭ tio, kion eblas antaŭvidi — la grafinaj monrimedoj eltenos? Kiom da tempo, laŭ via opinio, sinjorino grafino, mia edzino kaj mi povos resti ĉi tie, je via servo?”

„Nu, ni eltenos tute certe, ĝis venos la papo, ĉu ne? Mi jam petis monhelpon de la aŭtoritatoj tiurilate. Se ili volas, ke la papo, dum sia vojaĝo nialanda, vizitu ĉi tiun lokon kaj povu propramaŭne tuŝi la zonon de Sankta Gaspardeto, kiun antaŭ jarcentoj ricevis la prapatroj de mia karmemora edzo, ili certe konsentos havigi al mi monhelpon, por ke la kastelo iĝu dign-aspekta. Sed post tio..., post tio, mia kara Cipriano, mi dubas, ĉu ni plu eltenos pli ol tri monatojn.”

Cipriano estis alta viro, kaj lia korpa aspekto, kun la elstara ventro kaj la ĉiam paca vizaĝo, ĝenerale naskis en rigardanto nur la specon de respekto, kiuj oni kutime sentas al fortaj trankvuloj. Cipriano iel estis kiel la kastelo, kie li servis: nemo-vebla, nerompebla, ricevinta de la naturo la havindan povon superforti ĉiujn kaj ĉion. Alemenaŭ ŝajne.

Rigardante lin nun, la grafino de-Montokalva, unuafoje en sia vivo, vidis en li homon kompatindan, kiu subite malĵuniĝis kaj perdis la povon rebati al novaĵo, kiu unubate disfalis lin.

„Se estas nenio plu je via servo, via grafina moŝto, mi...”

„Nenio plu, Cipriano, vi povas foriri. Mi...” Ŝi interrompis sin, rigardante lin rekte en la okulojn.

„Mi petas vian pardonon,” ŝi finis diris, mallaŭte.

„Via grafina moŝto!”

„Ne! Mi petas, ne kontraŭdiru. Prizorgi vin estis mia devo, ĉu ne? Mi bedaŭras, ke mi ne sukcesis. Tiaj estas la tempoj, Cipriano. Ni povas nur akcepti ilin tiaj, kiaj ili estas. Ni provu trovi en ni kuraĝon, ni ĝin bezonas. Espereble ni havas de ĝi sufiĉe, ankoraŭ, je nia aĝo.”

„Jes, via grafina moŝto. Bonan vesperon, via grafina moŝto.”

Kaj, provante elmontri kiel eble malplej sian batitecon, Cipriano eliris kun movoj iom necertaj, jes ja, sed tamen digne.

(daŭrigo en la sekva numero)

TUTE SIMPLA ĈIUTAGO...



ERETOJ

LASU LA VIRINOJN DORMI

Pasintseptembre kaj -novembre vi estis tre dormema kaj laca persono. Eble, vi jam pensis ke io rilate vian sanon ne estas en ordo. Ne timu, ĉio estas tute normala kaj natura. Sciencistoj diras ke dum tiuj du monatoj la homoj sentas sin tre lacaj, kontraŭe dum majo kaj junio ili estas tre viglaj, kaj laboremaj. Ili sentas sin fortaj kaj sanaj. La samaj sciencistoj certigas ankaŭ ke virinoj bezonas pli da dormo. Ili devus dormi 54 minutojn pli ol viroj. Nome, viroj dormas meze 7,8 horojn po tago kaj virinoj devus dormi 8,7 horojn tage por senti sin ripozintaj kaj freŝaj. Do, lasu la virinojn dormi!

KIAL OVOJ VERDIĜAS DUM KUIRADO?

Se vi longe kuiras ovon, ĝi ne estos nur malmole kuirita, sed al vi povas okazi ke ĝi ene verdiĝos. Ĉu vi scias kial? Pro fero-sulfido!

Kiel ĝi eniris? Kiel fera mineralo eniris en vian ujon? Ne timu; la respondo estas tute simpla: Kiel vi scias ĉiu ovo havas ovoblonkon kaj ovoflavon. La ovoblanco enhavas proteinojn. Kiam vi tre varmigas la ovon, el la proteinoj eliras la gaso H_2S (sulfurhidrogeno), la gaso fama pro sia „bonodoro” je putraj ovojn. La gaso eniras en la ovoflavon kie ĝi kun feraj saloj faras novan kemian fero-sulfidon. Ĝi estas verda. Do, finfine vi vidas kiu kolorigis vian ovon.

PLI LONGAJ TAGOJ — PLI GRANDAJ OVOJ


En granda parto de Eŭropo oni ŝanĝis la tempon, oni transiris al la tiel nomata vintra tempo, kaj tiu tago enhavis unu horon pli. Bedaŭrinde ke temis pri nur unu horo, ĉar usonaj sciencistoj certas ke por kokinoj kiuj demetas ovojn la plej taŭga tagdaŭro estas 28 horoj. Nome se la tago daŭrus 28 horojn la ovoj kiujn ili demetas estus pli grandaj ol tiuj demetitaj dum 24-hora tago. Fakte la plej bona ritmo por kokinoj estas du horoj de la tago, ses horoj de la nokto, kaj denove du horoj da lumo kaj poste 18 horoj da mallumo — do entute 28 horoj. Kiel tio funkcias la sciencistoj mem ne scias, sed la eksperimentoj montris ke la ovoj estas pli grandaj se la kokinoj vivas laŭ tiel proponita ritmo. Kiu ne kredas povas mem eksperimenti,

PACODORO

En multaj lingvoj la eldiraĵo ke io „odoras je paco” ne sonas tro strange kaj nelogike. Nome oni kutimas diri por iu trankvila kaj harmonia familio ke „ilia domo odoras je paco kaj harmonio”. Sed ke tio ne estas nura poezia metaforo montris sciencaj esploroj kun fiŝoj.

Nome en unu akvario vivis trankvilaj kaj kontentaj fiŝoj, en alia maltrankvilaj kaj agresemaj. Kiam oni elverŝis akvon el tiu dua akvario kaj anstataŭigis ĝin per la akvo el la akvario kie vivis trankvilaj kaj bonkoraj fiŝetoj, la agresemaj tuj ekestis trankvilaj.

Ŝajnas ke sekreto estas en odoro. Nome, la trankvilaj fiŝoj havas apartan odoron per kiu ili odorigis sian akvon. Poste tiu ĉi pacodora akvo influis al la agresemaj fiŝoj kaj plibonigis ilin.



Desegnis T. Kuĉinac

MANGEBLAJ UJOJ

Ĉu vi iam aŭdis pri homoj kiuj povas manĝi feraĵojn, aŭ vi eĉ en cirko vidis iun tian personon? Kelkaj el ili diras ke ili povas formanĝi tutan aŭtomobilon, la plejmanĝemaj certas ke por ilia apetito eĉ ŝipo ne estas sufiĉa... sed ĉu vi iam imagis ke vi mem ankaŭ apertenas al tiuj feromanĝantaj personoj? Kaj ne nur vi, ni ĉiuj... nome, sciencistoj esploris ke acidaj manĝaĵoj 'degeligas' la metalajn ujojn en kiuj ili estas kuiritaj. Tiakaze ili mem pliriĉiĝas per 'degelita' fero. La kvanto de tiu fero povas esti eĉ tiel granda ke ĝi kvarobligas la tutan kvanton de fero en la manĝaĵo.

Ĉu vi jam rimarkis ke homoj kiuj kutime balbutas ne havas tiun problemon dum kantado. Do, balbutantaj homoj kantas senprobleme.

* * *

Oni kalkulas ke la terglobo ekzistas jam ĉirkaŭ 5 miliardojn da jaroj. Kompare kun tio la malfruigo de „Ovo” estas nerimarkebla.

* * *

Eĉ 14 faraonoj en la antikva Egiptio nomiĝis Ramzes.

* * *

Kvin monatojn bezonas niaj ungoj por kreskado de la bazo ĝis la fingropinto.

* * *

Laŭ la esploroj de sciencistoj el Chicago edziĝintaj viroj estas pli feliĉaj ol needziniĝintaj inoj. Needziniĝintaj inoj estas pli feliĉaj ol edziniĝintaj. Kaj finfine edziniĝintaj virinoj estas pli feliĉaj ol needziniĝintaj viroj.

* * *

Se vi vojaĝas kune kun via edzino kaj ŝia patrino, lasu vian edzinon ŝofori kaj la sidlokon apud ŝi rezervu por via bopatrino. Kial? Ĉar laŭ statistikoj la malantaŭaj seĝoj en aŭtomobilo estas trioble pli sekuraj ol la antaŭaj.

* * *


Personoj kiuj 11 minutojn dormas nemoviĝante estas vere raraj, ĉar kutime ĉiu persono faras iun ajn movon en tiu periodo.

rebuso

La solvoj de la rebusoj en la pasinta numero estas: VENT' kaj ELITO.

Aŭtoro J. Jug

Desegnis T. Kuĉinac





En tiu ĉi numero ni prezentas al vi kelkajn flugeblecojn de STA Travel, 117 Euston Road, London NW 1, Granda Britio. Ĉiuj ekflugoj de sur Londona aerhaveno, kaj la prezoj en anglaj pundoj.

Vojaĝcelo	Prezo de unu-direkta bileto	Prezo de revenbileto
Calcutta	205.-	398.-
Kathmandu	298.-	528.-
Osaka	365.-	730.-
Peking	274.-	524.-
Singapore	226.-	445.-
Sidney	346.-	590.-
Lima	216.-	432.-
Panama	198.-	396.-
Rio de Janeiro	249.-	498.-
Cairo	115.-	215.-
Lagos	175.-	350.-
Nairobi	181.-	333.-

INTERNACIA HELPO

Ĉi nokte vi ne povis dormi? Viaj problemoj ŝajnas al vi nesolveblaj? Vi sentas vin tute sola kaj senpova en tiu ĉi vasta mondo? Ne estu pesimisto, levu la kapon! Almenaŭ OVO-redakcio pensas pri vi. Por helpi al vi ni enkondukis la rubrikon „Internacia Helpo”. Tio signifas ke ne nur la redakcio, sed ankaŭ nia legantaro kunhelpos ...

? Jam longtempe mi serĉas mondkreanton, kiu proponos al la gefumantoj ĉapelon kun globo kaj longa tubnazego, kiun oni povos kunigi ĉe la fenestrovitro... kaj tiel eksterigi la fumon, ĉar puraj (almenaŭ nefumigitaj) lokoj iĝas pli kaj pli malmultnombraj.
Krome, mi serĉas ankaŭ ideon por ĝeni fumantojn samkiel ili ĝenas min?!
Therese Sabatier, Ormessois, Francio

! Mi kun sukceso jam dum jaroj uzas kontraŭ angino kaj gorgomalsanoj la tiel nomitan drogherban vinagron de doktoro Vogel — MOLKOSAN. Ĝi venas el Svisio kaj ĝi estas mondkonata. Ĉe ni en Belgio ĝi vendiĝas en diet-butikoj aŭ apotekoj. Oni povas trinki ĝin. Ĝi estas tute malvenena.
Edwards Spitaels, Schoten, Belgio

„OVO”
INTERNACIA GAZETO POR DISTRO
KAJ AMUZO
Aperas 15 foje jare.

ELDONAS: Kroatia Esperanto-Ligo, Amruŝeva 5/1, 41000 Zagreb, Jugoslavio.
KONSILATARO: Ljerka Begič, Zlato Cundekovič, Đorđe (Gorĝe) Dragojlovič, Gordana Plavšić, Slavko Šimunič, Ivica Špoljarec, Spomenka Štimec.

REDAKCIO: Milena Grgič, Jozo Marevič, Nikola Rašić, Slavko Šimunič (ĉefa kaj respondeca redaktoro), Ivica Špoljarec (grafika kaj teknika aranĝo), Zlatko Tišljar.

ADRESO: „OVO”, Kroatia Esperanto-Ligo, Amruŝeva 5/1, 41000 Zagreb, Jugoslavio, tel. (041) 424 660.

PRESAS: Srednja ŝola tiska in papirna Ljubljana, Jugoslavio.

PREZO de unu ekzemplero: 3 guldenoj (aŭ egalvaloro), por Jugoslavio 60.-din. JARABONO: 35 guldenoj (aŭ egalvaloro), por Jugoslavio 700.-din.; validas por 15 numeroj ekde la momento de la enpago.

PAGU per poŝtpagilo al la adreso de la eldonanto aŭ al la perantoj.

PERANTOJ

BELGIO: Eldonejo „Sonorilo”, Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk.

FRANCIO: Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris, Francio.

FR GERMANIO: Esperanto-Centro, Postfako 1450, D-4790 Paderborn.

KANADO kaj USONO: Zdravka Metz-Fleury, 6358 de Bordeaux, Montréal, Québ. H2G 2R8

NEDERLANDO: UEA, Nieuwebinnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam.

ga, ga...

Ga, ga, samideanoj...

Kiel vi fartas? Mi bonege, ĉar ĵus mi revenis de la 2-a Balkana Esperanto-Kongreso, kie mi estis ŝpiciala delegito de mia birdaro. Tie mi bonege amuziĝis, sed nun mi sentas veran malagrablon, ĉar nia ĉefredaktoro postulis de mi fari raporton pri ĝi. Ŝajnas ke li vere malamas min, ĉar tio ĝis nun neniam okazis al iu nia delegito. Nome, ni ofte, bele kaj unuvoĉe elektas delegitojn por diversaj Esperanto-renkontiĝoj, kongresoj, simpozioj... ni pagas ilian vojaĝbileton, iliajn restadkostojn, ofte ni donas al ili eĉ tagsalajrojn, sed neniam ni poste demandas ilin kion ili tie faris, ĉu ili entute aktive partoprenis... Nur, nia maldeca redaktoro tion postulas de mi...

Do, kion fari? Devo estas devo... sed kion diri pri ĝi? Ĝi estis same bela kaj utila por la homaro kiel ĉiuj aliaj E-aranĝoj. Sed, iom pli konkreta pruvo ol aliaj similaj aranĝoj, ke la Esperanto-Movado estas la sola movado en la mondo kie ĉiuj homoj egalrajtas. Tie havis la saman eblecon paroli kion ajn eĉ kiom ili deziris perfektaj saĝuloj kaj perfektaj stultuloj. Mi mem, same kiel la plej multaj kongresanoj ne parolis

multe. Unue ĉar mi tute ne interesiĝis pri la kongresa temo, kaj due ĉar mi kutimas partopreni nur la malfermojn kaj la fermojn de la kongresoj.

La malfermoj plaĉas al mi, ĉar dum ili ofte parolas diversaj urbestroj, ministroj kaj ambasadoroj. Ili ne nur bele parolas pri nia kara Esperanto, sed eĉ ofte poste manpremas nin ĉiujn. Dum tiu grava momento de manpremadon ni lertaj esperantistoj havas okazon fotiĝi apud ili. Kaj vi scias ke fotoj estas bonaj dokumentoj. Per ili oni poste en sia vilaĝo aŭ grego povas konvinki siajn amikojn pri sia granda amikeco kun diversaj diplomatoj en la mondo.

La fermojn ne partoprenas ambasadoroj, sed ili estas ankaŭ belaj. Dum ili, ni veraj esperantistoj sentas nin tre fieraj kaj potencaj, ĉar tiam ni montras al la cetera mondo kiel facile kaj glate ni kapablas solvi mondajn problemojn... Ĉi foje ni decidis ke la Angloj bonvolu redoni al la Grekoj la iam ŝtelitajn antikvaĵojn de Partenono, kaj ke la Olimpiaj ludoj estonte okazu ĉiam en Greklando.

Tiun ĉi duan decidon ni faris aparte saĝe kaj politike. Ĉar nun la homaro ne

plu vane elspezas monon por la konstruado de sportejoj tra la mondo. Restos al ili grandegaj monsumoj. La homaro estos riĉa, kaj ĉu vi scias kion ĝi faros per tiu ĉi ŝparota mono? Ne? Ni trovis solvon! Ili bonvolu konstrui Esperantomuzeojn en ĉiu urbo (se la urboj estas grandaj, ankaŭ en la antaŭurboj). La superfluan monon ili sendos por la konstruado de Balkana Esperanto-Muzeo, kiun ni decidis konstrui. Kie, kiam kaj kiamaniere ni ankoraŭ ne decidis. Sed, momente tute ne gravas. Gravas la decido ke ni konstruos ĝin. Ni klare skribis ĝin sur unu papero.

Pro niaj geniaj decidoj kaj solvoj, multaj pensos ke ni estas geniuloj. Sed, ne estu ni modestaj. Ni devas diri ke ni tamen ne povas rapide solvi ĉiun problemon. Por trovi tiujn solvojn ni ankaŭ devis dum kelkaj tagoj laboregi, ofte eĉ dumnokte. Ĉiuj? Ne, ne ĉiuj simplaj kongresanoj, nur ni funkciuloj kaj delegitoj de niaj landaj asocioj. La laboro estis peza, sed ni estas feliĉaj ke ni sukcesis... Eble ni devas aparte danki al la prezidanto de LKK, unu profesia psikiatro, kiu brile gvidis ĉiujn kunsidojn, ĝis niaj gloraj celoj.

KONKURSO!

SENDU AL NIA REDAKCIO ĈION
KIO ESTAS LIGITA KUN OVO KAJ
OVUMADO.

Ekzemple: ŝercojn, karikaturojn, fo-
tojn, poemojn, rakontetojn, rebusojn,
proverbojn, receptojn pri ovomangoj
ktp., aŭ ion pri la sciencaj esploroj pri
ovoj, pri ovo en diversaj lingvoj, pri la
rolo de ovoj en la homa historio, pri la
specoj de ovoj, do, pri ĉio ajn ligita
kun ovoj.

Vi povas sendi ion kion vi mem el-
pensis aŭ verkis, ion kion vi ie vidis,
tralegis, pruntis aŭ ŝtelis.

Sur la paĝoj de OVO ni aparigados
viajn kontribuojn kaj premios la
plej kvalitajn.


Jen nia adreso:

Kroatia Esperanto-Ligo
(„OVO”-konkurso)
Amruŝeva 5/1
YU-41000 Zagreb

„OVOFONTOJ”

En la „Frankonia Svislando” (regiono inter la
urboj Nurenbergo, Bamberg kaj Bayreuth) dum
la paska tempo (en printempo) oni ornamas la
fontojn per centoj da ovoj.

La ovoj estas simboloj por la fruktodoneco kaj
por la renoviĝanta printempa vivo. Tiel la enlo-
ĝantoj dankas al la fontoj pro la vivodona akvo.



La fotojn sendis
Rudolf Messerer
el FR Germanio.

FOTO

Ekzistas neimageble multe da homaj vizaĝoj, loĝlokoj, pejzaĝoj kaj vivsituaĵoj dise tra la mondo. Neniu el ni, en
sia vivo, havos okazon mem vidi ĉiujn ekzistantajn belajn, ĉesti ĉiujn okazaĵojn kaj renkonti ĉiujn homojn,
sed ĉiu el ni posedas la parteton de la tuto.
Ni deziras ke, pere de fotoj, en tiu ĉi rubriko ni intersanĝu niajn bildajn posedaĵojn; simple por pli senti la kun-
estadon kaj por pligrandigi nian konon pri la mondo.
Al ĉiu foto kiun vi sendas aldonu mallongan priskribon.

„RIPOZMOMENTO”

Surstrata sceno en Skopje
(Makedonio, Jugoslavio)

Fotis Vladimir Ŝimunić

